

la progreso



OFICIALA ORGANO DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA
REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: PRAHA-VII. SOCHAŔSKÁ 333

Jarabono (10 numeroj) Kĉ 20.—; fremdlando Kĉ 25.— (aŭ 4 sv. fr.) Escepto: Aŭstrio, Jugoslavio, Pol-
lando kaj landoj de Stockholma interkonsento: 3 sv. fr. Konto de Poŝta Ŝparkaso Praha: N-ro 34.271.

Va ĈEĤOSLOVAKA ESPERANTO-KONGRESO EN OLOMOUC.

14.—16. MAJO.

La antaŭlaboroj ĝojige progresas. Al tiu ĉi nro estas almetita presita aliĝilo, redaktita de ĈAE, GEL kaj LKK. La urbestro de Olomouc akceptis jam protekton de la kongreso, permesis uzi ĉambregon en la historia urba domo por kunsidoj, destinis straton, kiu estos nomita Strato de dro L. L. Zamenhof, transprenos ankaŭ zorgon pri la Esperanto-arbo kaj pri la memorŝtono de la kongreso. Loĝejoj en sufiĉa nombro kaj en diversaj prezoj estas prizorgitaj. Kongresanoj sendante kotizon bonvolu antaŭsendi ankaŭ la necesan monon por loĝejoj. La LKK petas ĉiujn enlandajn kaj eksterlandajn klubojn kaj organizaĵojn, subteni nian daŭran monumenton de Esperanto per pago de 150 Kĉ. Nomoj de subtenintaj organizaĵoj estos enĉizitaj en ŝtonbloko 2 m alta, starigota ĉe la Arbo Esperanto.

Ni atentigas, ke aliĝintoj ricevos kongresajn dokumentojn post kongreso per poŝto, se ili estos malhelpataj persone ĉeesti kongreson.

Grava sciigo. Ĉiu samideano, kiu aliĝos ĝis fino de aprilo kaj poste persone partoprenos la kongreson ricevos senpage valoran literaturaron. La donacado okazos per lotumado tiel, ke ĉiam inter dek aliĝintoj estos disdonitaj libroj valorantaj Kĉ 150.—. Do ĉiu deko da kongresanoj ricevos la pagitajn kongreskotizojn. La lotumado okazos en publika kunveno de LKK, por ke ĉiu aliĝinto povu partopreni la lotumadon aŭ mem aŭ per sia konfidenculo.

Por kongreso disponigis MEP sian konton.

Notu: Moraviaj Esperanto Pioniroj, Olomouc, No 203.025 Praha.
L. K. K.

Ĉe la arbo „Esperanto“ staros 2 m alta kaj 1 m larĝa granita memorbloko, kies unu flanko estos prilaborita de mano artista. Ne temas sole pri loka sukceso kaj propagando, sed ankaŭ pri tutmonda, ĉar tiaj vivantaj monumentoj povus esti plantataj en multaj urboj de nia esperantujo ĉe konvena okazo per reciproka helpo. Arbo sola sen dediĉo ne estus sufiĉa propagandilo. Nia memorbloko portos jenan dediĉon: Arbo Esperanto, plantita la 15. V. 1932. Laŭ profetaĵo de Comenius, dum estrado de ŝtatestro T. G. Masaryk, de urbestro Dr. R. Fischer por honoro al Dro L. L. Zamenhof de V-a ĉsl. Esperanto-kongreso kaj de—sekvos la nomoj de esp. organizaĵoj. Ni elektis la arbon Liriodendron tulipifera. (Liliovnik.) Starante en parko tre multe frekventata, ĝi nepre allogos neesperantistojn kaj plenumos sian propagandan taskon. La ideo interfratiga kaj malamon foriganta meritas tian videblan signon prefere ol ideo homaron detruanta. Ni ĝojus se ni baldaŭ povus helpi al tiuj, kiuj helpis kaj helpos nin. Ne forgesu ankaŭ kunpreni, aŭ sendi teron kun dediĉaĵo al la planta ceremonio. Al ĉiu subtenanto ni sendos foton de la arbo kaj memorbloko. — La projektita 12-taga Cseh-kurso antaŭ la kongreso ne okazos pro nesufiĉa nombro de partoprenantoj. — Templimo por ekskursoj 5 tagoj antaŭ la kongreso, alie ili ne povus esti efektivitaj. — Kongresanoj vetu-

rontaj tra Praha nepre interesu vin pri la speciala trajno, kiu ebligas konsiderindan avantaĝon kaj demandu tuj ĉe s-ro O. Ginz, Stárkova 4, Praha II. Ĉar samtempe estos en Olomouc kongresoj de Fajrobrigadistoj kaj Skoltoj estas urĝe necese antaŭpagi loĝejon. Venu multnombro, via nombro reprezentos nian forton. Gis 19. IV. aliĝis 120 p.

A. K.

ALIGIS:

Neoral Lucio, Olomouc. — Kudeřa Antonín, Olomouc. — Řebíček Josef Olomouc. — Heikenwälder František Prostějov. — Heikenwälderová Máňa Prostějov. — Malíček Adolf Prostějov. — Friedrich Josef Košice. — Friedrichová Böszi Košice. — Mastná A. Olomouc. — Mastný J. Olomouc. — Poláček Jan — Nečas Rudolf Brno. — Nečasová M. Brno. — Strejček A., Brno. — Strejčková M. Brno. — Válka Fr. Brno. — Váľková M. Brno. — Baďura Fr. Brno. — Hoffner J. Brno. — Musil J. Brno. — Vondroušek Josef Brno. — Skulina Louise Český Těšín. — Pońca Josef Ropice. — Becková Erna Prostějov. — Kliener Vilém Prostějov. — Hurka Anni Český Těšín. — Drtil Marta Český Těšín. — Straka Karel Praha. — Kuba Fraňa Olomouc. — Kubová Soňa Olomouc. — Dr. Fousek Jos. Přelouč. — Fousková Marie Přelouč. — Jukl Vlado Bratislava. — Mrázková Tonča Olomouc. — Blažek Jos. Olomouc. — Šupichová Jul. Praha. — Krumpolc Jos. Šenov. — Dr. Kamaryt St. Bratislava. — Krejčí Konrād Olomouc. — Hladký Jar. Karvinná. — Hladká Mil. Karvinná. — Oslzly Alb. Prostějov. — Ziková Marie Olomouc. — Neužil Alb. Olomouc. — Neužilová Fil. Olomouc. — Neužil Lumír Olomouc. — Koudelka Fr. Přerov. — Koudelková Lud. Přerov. — Čechová Jitka Č. Třebová. — Vavroušková Anna Ústí n. O. — Dr. Odstrčil Jar. Olomouc. — Poláček Jan Břeclav. — Baculík Jan Zvolenská Slatina. — Baroch Mar. Sl. Ostrava. — Otruba Stan. Těšetice. — Uilbrich F. Bürgstein. — Popper Hugo B. Kamnitz. — Kudelová Mar. Olomouc. — Kudelová Hild. Olomouc. — Kudelová Ema Olomouc. — Tyl Ant. Prostějov. — Slavík Fr. Praha. — Veselý Arn. Prostějov. — Skulina Fr. Boconovice. — Bártová Alb. Olomouc. — Židová Anežka Olomouc. — Růžička Fr. Holešov. — Gollia Rud. Olomouc. — Adamcová Mar. Brno. — Ondráčková Mar. Brno. — Míček Fr.

Brno. — Vítek J. F. Tisovec. — Chlebošová Mar. Olomouc. — Grün Jul. Olomouc. — Dr. Skládal Fr. Olomouc. — Weinstein Leop. Olomouc. — Zeman Pavel Olomouc. — Jandřava Mařia Uh. Hradiště. — Rambousek Jan Č. Budějovice. — Ginz Otto Praha. — Badin Viktor Nové Zámky. — Kšir Ferd. Olomouc. — Kuba Karel Olomouc. — Kubová Mar. Olomouc. — Kuhner Bedř. Bzenec. — Kučera Fr. Kunovice Uh. Hradiště. — Pour Oldř. Přerov. — Mazáč Al. Předměstí. — Tiheřka Vojtěch, Přerov. — Svačinová M. Přerov. — Kavková Lída Přerov. — Blažková Al. Přerov. — Grauerová A. Přerov. — Řebíček Jar. Praha. — Machálek Fr. Přerov. — Mádrová Ant. Olomouc. — Uhrová-Křivancová F. Písek. — Rabi Irena Praha. — Pittner Bř. Olomouc. — Peschke Klara Kopřivnice. — Macháček Al. Hořice. — Pytloun Vojslav Bakov Jiz. — Moc Stan. Bakov Jiz. — Žundáľková Laura Olomouc. — Sklenčka Otto Hradec Králové. — Sklenčková Bož. Hradec Králové. — Šprincová Mar. Olomouc. — Jedlička Vojt. Olomouc. — Bartošík Dořfa Ostrožské Předměstí. — Stehlík Fr. Těšetice. — Křivancová E. Bratislava. — Bárta F. Bratislava. — Novosad J. Bratislava. — Brenner V. Bratislava. — Havráňková M. Prostějov. — Střihavka Václav Kladno. — Vičková Bož. Dubí u Kladna. — Litera Fr. Dubí u Kladna. — Hamaň Jos. Hnidousy. — Hromada R. Praha. — Šustý Jar. Praha. — Herzigová R. Praha. — Staněk Fr. Praha. — Tarantíková A. Praha. —

Ne hezitu TUJ aliĝi al la kongreso en Olomouci!
Per tuja aliĝo vi plifaciligos la laboron de la aranĝantoj.

Por aliĝo uzu la enmetitan aliĝilon. Ĉar la kvanto da aliĝiloj senditaj al ni de LKK estis ne sufiĉa, en multaj numeroj mankos la aliĝilo. En tiu okazo skribu tuj vian aliĝon per simpla poŝtkarto al Esperanto-Societo Olomouc, Horní Novosadská.

Niajn legantojn en Praha ni denove atentigas pri la speciala vaĝonaro, kiu ebligas viziton de la kongreso por sumo 194 Kč.

Vidu detalan informon sur p. 41.

Slovnik obchodně-technický, účetní a daňový.
Sešit č. 28 - 30.-IV obsahuje: Komisionář - Komory - Komunální zápůjčky - Komunitý - Koncentrované závody - oncese - Konfekce - Konkurence a krácení důchodů - Konkurs - Konopí - Konosament - Konservy - Konsignační sklady - Konsorcium. Vydávají Tiskové podniky Ú. S. Č. P., Praha I, Masarykovo náměstí, 4. Cena sešitu Kč 19 50.

JAN NERUDA:

LA UNUA DE MAJO.

Komencis maj', tempo de l'am'*)

Majo 1890.

Bonvolu pardoni, ke ankaŭ mi komencas ankoraŭ per tiu nia, kvankam poezie ĉarma, tamen vere troege reuzata frazo. Tamen ĉi tiun fojon ne estas alia ebleco. Kvankam oni jaron post jaro uzas tiujn vortojn de Mácha ĉirkaŭ la 1-a de majo mil- kaj milfoje tra Bohemujo, tamen ĉi-jare, kaj nun permesu, ke mi jam ree uzu multe uzatan, multe misdiratan frazon: mi volus havi nur tiom da florenoj kiom foje ĝuste ĉi tiun jaron estis ĉe ni tiuj vortoj eldiritaj kaj ofte ja nur kvazaŭ senvole — kiel en sonĝo — per silenta flustreto.

Jes. Komencis maj' de la jaro 1890. Kaj kiu ĝin kiel viro maturiĝinta, pensema travivis, ĝin ne forgesos ĝis lasta tago de sia vivo.

Estus interese legi iun ĉefe skribitan, per vera poezio surradiatan, per profundaj, vere homecaj pensoj satigitan „Misterion“ en kiu sin prezentus unuopaj ĉefaj tagoj de la tuta jaro kaj inter si oratore luktus, kiu do el ili estas su- per la aliaj, kiu estas la ĉefa.

Sin prezentu ekzemple la Tago de la Nova jaro. Sed ne tiu frivola, el fremdujo al ni transportita, kun kapo peza kaj kirla, kun ceremonio vanta kaj abomena, plena da mensogoj kaj plena da trudema egoismo. Ne tiu, sed la ĉefa Tago novjara, kia spiras ĝis nun en nia vilaĝo. Kiam estas en la hejmo tiel silente, tiel sankte. Kiam ĉie estas tiel pure, ĉio jam hieraŭ ordigita kaj prizorgita kaj estas farata sole la plej necesa, neprokrastebla laboro. Kiam homo kun homo parolas tiom milde, preskaŭ nur duonflustre kaj gardas sin, ke li per nenio kolerigu, ekscitu. Kiam oni surmetas por la preĝejo sian plej belan vestaĵon kaj tie arde preĝas kaj poste ĝis nova labormateno sentas sin hejme ĉiuj tiel feliĉege, tiel bele.

Sin prezentu la Tago Kristnaska, aliloke tago plena da foira tumulto, tago da eksterordinaraj, multekostaj festenoj, tago da reciprokaj, surprizaj donacoj — ĉe ni en la vilaĝo sole bildo de

nia malriĉa vivo, tamen de ora, familia feliĉo. Kiam post la tago dediĉita al la ordinara tumulto venas vespero frankvila, oni piedpinte, por ne brui, kunvenas en la ĉambro kaj eksidas al la tablo, kontente manĝas sian fungan supon, ĝrasumitan grietaĵon, bonfarunajn platkukojn, stufitajn sekajn fruktojn — sed poste tuj kaj ankoraŭ pli proksime kunsidiĝas unu al alia kaj rakontas ĉiajn tiujn strangajn legendojn, pri epokoj iamaj, pri landoj malproksimaj, pri tio, kiel estis naskita la Savonto kaj kiel estis la sankta nokto subite plena da taga helo kaj la anĝeloj kantis kaj kiel popolo malriĉa rapidis al Betlehemo kaj estis la unua, kiu adorklinitis antaŭ la Savonto, la unua, kiu ekkonis, ke en egaleco homa kuŝas la savo de l' homaro — kaj kiam poste ĉiuj aŭskultantoj kaj rakontantoj sentas, kvazaŭ jam fakte heliĝus super iliaj kapoj kaj estus aperanta tiu savo kaj ili sin levas, krucosignas kaj iras komune al la matena meso — renkonte al la nova mateno.

Sin prezentu la Karnavala mardo, akompanata de muziko kaj kanto, iganta, ke ĉies okulo brilas de gajeco, piedo ekdancas, koro eksaltas kaj buŝo ĝojkrias. Sin prezentu kaj kun ĝi vetu la 1-a de aprilo, ŝerca, embuska, plena da ŝercoj kaj artifiko, plene kovrita de sonoriletoj kaj mokaj fajfiloj.

Sin prezentu la 1-a de majo, kronita per juna vinka verdo. Kun bonodora konvalo brilanta en la haroj. Kun najtingala kanto sur tremanta lipo. Kun arda fajrero de amo en sopira okulo.

Miloj da poetoj jam ĝin prikantis. Miliardojn da homaj koroj ĝi helpis al rapida feliĉega batado. Tamen ĝi verŝajne ne scius, kion do pozitivan ĝi povus por sia avantaĝo diri. Ĝia fako estas ja la vasta regno de belo kaj amo, sed ĝia efiko fariĝas nur kaŝe, en silentaj densaĵoj arbaraj, en interno de vekiganta burĝono, en malfermiĝantaj koroj. Ĝi ne amas bruon kaj tumulton. Ĝi ne ŝatas svarmantan societon, amuzon amasan: ĝi ŝatas delikatan rigardon de sola duo da okuloj, dolĉan flustradon de sola duo da lipoj.

Efektive ankaŭ — kompreneble pro hazardo — la serioza, peze paŝanta hi-

storio de la homaro ĝis nun ĉe ĝi preskaŭ eĉ ne haltis, ĉe la 1-a de majo. Laŭvere — ĝis antaŭ nelonga tempo, ĝis kiam venis la 1-a de majo 1851 kaj malfermis la unuan Ekspozicion tutmondan kaj en ĝi kunigis ĉiujn naciojn subite al unusola rondo.

Kaj ne forpasis eĉ kvardek jaroj kaj venis jam la 1-a de majo 1890. Estas vere, ke ni, kiuj ĝin atingis, ĝisvivis la plej memorindan fagon de la homa historio entute.

Per trankvila, fera paŝo alpaŝis la 1-an de majo 1890 batalionoj laboristaj, nombregaj, ne superrigardebaj kaj vicigis en la homan falangon, por iri jam por ĉiam per la sama maniero kun ni ceteraj al la noblaj homaj celoj, same rajtigataj, same ŝarĝitaj, same feliĉegaj.

Ĝi estis marŝo fortega, nerezistebla, kvazaŭ moviĝis antaŭen ondoj oceanaj. Kiu observis, tiu ekkomprenis, kion signifas „forto elementa“. Eĉ transmetita al afero spirita, morala.

Eksterordinara tago . . . Stranga humoro . . . Ne timo, ho neniel. Pri ties ebleco eĉ ne venis al mi ideo. — Sed tia stranga atendado de io necerta, nepre nekonata, ekstremitis ankaŭ ĉiujn miajn nervojn. Sento neniom agrabla. Mi memoras nur du momentojn en mia vivo, kiam — kvankam simileco al la momento tria laŭvere estas tute neniam — mi havis senton tamen egalan: nome antaŭ tiu „necertaĵo, nekonataĵo“. Unuafoje en 1848 dum la horoj, kiam Praha estis bombardata; tiam la sama sento vekigis kaj daŭris inter unuopaj pafoj de bombaj pafitegoj. Kaj duan fojon en 1866 tiun antaŭtagmezon, kiam la prusoj proksimiĝis al Praha.

Neordinara tago. Tia silenta, peza, malserena. La strato kun tute alia aspekto. Neniuj provokaj ĉapoj de la germanaj studentoj. Neniuj kaleŝoj, eĉ ne droŝkoj. Neniuj sinjoroj. Neniuj sinjorinoj. Sole tiu kiu devis kaj inter tiuj ankaŭ ni, kiujn malriĉa laboristo kalkulas al „sinjoroj“, sed sinjoroj prave konsideras „laboristoj“.

Tiam subite komencis ruliĝi homamaso, en direkto de Prašná brána (Pulvarturo): laboristoj marŝis el Karlín al kunveno en la Praha mitingo.

Mi iris intence kontraŭ la tuta amasfluo. Ruĝaj insignoj, ruĝaj kravatoj —

kiel zigzaga fulmo trakuris la cerbon rememoro pri la komuno, pri ruĝaj flagoj de anarhistoj. La unuan fojon mi ĝin vidis sur homoj, tiun malhele ruĝan koloron de la tutmonda sociala movado: mi ekstremitis. Mirinde — mirinde . . . — La samaj koloroj: ruĝa sur malhele ruĝega fono, kiuj flirtis super la kapoj de Husanoj ĉefaj, batalantoj por libereco religia, la samaj koloroj flirtas hodiaŭ super la kapoj de batalantoj por plena egaleco civitana.

La amasoj ruliĝas. Ne densaj, sed intence maldensigitaj, tial des pli senfinaj. Ĉio en festa vestaĵo, pura, brilanta. En la manoj bastonetoj malpezetaj, festaj, promenaj bastonoj. Iuj manoj, eble ĝuste la plej kalaj, sed ne volantaj tiun sian malglatecon montri hodiaŭ, dum la festotaĝo, estas eĉ en ledaj gantoj.

La amasoj ruliĝas senĉese, sed bruo estas nur malmulta. La laboristoj iras preskaŭ silente, same kiel ni vidadas ilin iradi are dum vesperigo el la laboro: silentemaj, vorton ŝparantaj kun mieno serioza — kaj hodiaŭ tiel entute fere serioza. Nu, rigardu nur — vi vidas: jen vi havas ĝin jam markita en vizaĝo, la „elementan forton“. Sed oni eĉ ne ekstremitas de timo pro tio. Oni sentas, ke la forto estas regata per direktodona ideo. Kaj subite kvazaŭ per miraklo — oni subite ekkomprenis tiun ĉi-jaran „1-an de Majo“, subite oni vidas, ke la tuta ĝisnuna situacio politika kaj socia per unu ekmojo hodiaŭ sin ŝanĝis, sed ne sole por hodiaŭ.

Kaj en senfina fluo la amasoj ruliĝas pluen kaj rapidas al Střelecký ostrov (Pafista insulo) al tiu sia kunveno. Ili diskutos tie kune kelkajn horojn. Unuafoje pri malgrandigo de sia ĉiutaĝa laboro. Ili opinias ja, ke dio, havante por ili ĉiam ambaŭ siajn manojn plenegej da laboro, ne havas poste kompreneble, per kio beni ilin. Nu, dio benu vin.

Sed sur la stratoj spite la kunvenon la movado jam ne malkreskis. Ne dum la tago kaj ne dum la vespero. Eĉ ĉiun horon ĉie pli kaj pli multe da homoj. Kuraĝa, nekontestebla aspekto festotaĝa. Laboristoj poste jam fiere kun siaj edzinetoj ĉe la dekstra flanko: sur vanĝoj rideto kontenta, en la okuloj ĝoja fajrero. Kaj kun ili kaj inter ili Praha

cetera, ankaŭ kontenta, ankaŭ ĝojanta.

Stranga — eĉ strangeĝa tago. Vere eĉ la naturo ĉie ĉirkaŭe kvazaŭ sub leĝo egala. Matene sufoka nebulo, aero griza, tiel peza — poste subite liberiĝis la suno kaj estis tiel klara, tiel ora, tiel feliĉega.

Komencis maj' en 1890.

El la ĉeĥa: Oldřich Štěch.

Shakespeare kaj la bohema maro. Kiel okazis, ke Shakespeare en sia Vintra fabelo skribis pri dezerta marbordo de Bohemio kaj tiel vidigis nekomprenblan mankon en scio pri la tiam potenca mezeŭropa regno, en kiu angla reĝidino baldaŭ poste fariĝis reĝino? Ĉu li konis la bohemian historion tiel bone, ke li sciis, ke la potenco de la reĝoj bohemiaj atingis siatempe ĝis Adriatiko, aŭ tiu de la reĝoj polaj ĝis la Balta maro? Aŭ li ne kapablis prezenti al si potencon regnon sen aliro al maro en la tempo, kiam sen maro estis en Eŭropo sole la montoriĉa Svislando? Al ĉiuj ĉi demandoj respondas O. Voĉadlo en artikolo: „Studoj pri la literaturaj influoj,“ ke la kaŭzo de tio estis unu el la fontoj de Shakespeare, nome rakonto de Green, kiu parolas pri maltrankvila ŝipveturado apud la bohema marbordo, pri la bohema ĉefurbo kaj ĝia haveno. La angla dramverkisto prenis la bohemian maron simple el tie kaj la Shakespeara najbareco de Bohemio kaj Sicilio estas sole „poezia libereco“. km

EL ESPERANTO-MONDO

24. KONGRESO DE ESPERANTO EN PARIS

30. JULIO — 6. AŭGUSTO 1932

ADRESO:

MAISON DE FRANCE,

101, AV. DES CHAMPS-ÉLYSÉES PARIS,

Prezidanto de la Franca Respubliko, S-ro Paul Doumer, akceptis la Honoran Prezidantecon de la Patrona Komitato de la Kongreso.

Loĝejoj. Ekzistas kvar kategorioj: A kaj B (luksaj), C modestaj sed komfortaj, D simplaj. En ĉiuj la kongresanoj povas estis certaj pri pureco kaj bona servado. Prezoj: ĉambro kun unu lito por unu persono: A 35 fr., B 30 fr., C 25 fr., D 20 fr., ĉambro kun unu lito por du personoj: A 55 fr., B 45 fr., C 35 fr., D 30 fr.

Tiu ĉi prezoj enhavas servadon (trinkmonon) kaj impostojn. Ĉambroj kun du unupersonaj litoj estas maloftaj. Franca franko kostas cca 1.34 Kĉ. Plialtigante do la suprajn prezojn je unu triono, vi ricevas la sumon en Kĉ. La hoteloj estos kiel eble plej proksime al la Kongresejo.

La Akceptejoj kaj la Kunvenejo de la Kongreso troviĝos en Maison de la Mutualité (Domo de la Interhelpado) en la V-a arondismento, Latina Kvartalo.

Ĝis nun aliĝis 225 kongresanoj el 16 landoj, inter ili Francujo 137, Granda Britujo 19, Pollando 9, Germanujo 7, Ĉeĥoslovakio 5, Rumanio 1.

SPECIALA

VAGONARO EL PRAHA AL OLOMOUC

14.—16- MAJO 1932.

Forveturo el Praha-Wilson sabate la 14. Majo proksimume je la 14 horo. La preciza tempo estos sciigita per tagaj gazetoj kaj per radio. Halto survoje: Libeň, Kolín, Pardubice, Česká Třebová, laŭ aliĝoj eventuale ankaŭ en aliaj stacioj. La horojn de halto en ĉiuj stacioj demandu en via stacio.

Alveno en Olomouc proksimume je la 18 horo.

Forveturo el Olomouc lunde la 16. Majo je la 18 horo, alveno Praha je la 22. horo.

Prezo: rapidvagonara vojaĝo Praha-Olomouc kaj revene, loĝado, 2 maten-, 2 tag- kaj 2 vesper-manĝoj, asekuro kontraŭ akcidento,

ĉio por 194 Kĉ.

Oni pagas la samon, se oni envagoniĝas en iu survoja stacio.

Antaŭpago laŭeble 22 Kĉ tuj, la reston 172 Kĉ antaŭ la 5. Majo al la konto de Pošta Sparkaso en Praha Nro. 250.727 (Ortopedické družstvo Praha), per blankopagilo ricevebla por 5 h en ĉiu poŝtoŝtanco. Estas konto de la firmo, en kiu estas okupita Estro de nia Oficejo S-ro Slavík.

Oni povas — kaj ni rekomendas tion — pagi tuj la tutan sumon.

Al niaj legantoj ni varme rekomendas uzi ĉi tiun eksterordinaran okazon por oportuna kaj malkara partopreno en nia nunjara kongreso. La aranĝo de la vojaĝo certe kontentigos vin. La fervoja direkcio speciale atentigas nin pri tio, ke la loĝado kaj la manĝoj estos unuarangaj.

Por Komitato de CAE

O. Ginz.

PRI LA LIBROJ

Tra sovaĝa Kamĉatko. De Sten Bergman. El la sveda tradukis Birger Gerdman. Eldona Societo Esperanto, Stockholm, 1. 276 paĝ. Prezo: hroŝ. sved. kr. 4.50, tole bind. kr. 6.—, (sv. kr. = 7 (Kĉ.))

Norde de Japanujo situas la duoninsulo Kamĉatko, plena de altaj vulkanoj, krutaj montoj, grandegaj arbaroj kaj vastaj tundroj. En la riveroj la salmoj staras amase kiel sardinoj en skatoletoj, kaj en la arbaroj vivas plej valoraj felbestoj. En tiu lando de neĝostormo kaj mordanta frosto loĝas ŝovaĝaj malmulte konataj popoloj: kamĉatkanoj, lamutoj kaj korjakoŝ, kiuj gajnas sian porvivon per ĉasado, fiŝkaptado kaj boacbredado.

Tra tiuj sovaĝaj regionoj vojaĝis per ŝirhundoj kaj sledo la aŭtoro kun sia juna edzino dum du vintroj. Ili loĝis ĉe la indiĝenoj kaj manĝis kun ili, sed ne atingite vilaĝon ili ofte devis trankvili en libera aero dum akra, rigidiga frosto. Multfoje la vojaĝantoj riskis siajn vivojn, sed nenio povis ilin deteni de pluaj vojaĝoj kaj esploroj, kaj la ekspedicio kunportis al sia hejmlando rezultatojn kun plej granda valoro el scienca vidpunkto.

La vivoplena rakonto pri la aventuraj veturoj dumvintraj trovis la plej grandan atenton en la tuta mondo kaj la libro estas aperinta en 12 lingvoj. En Svedlando la tria eldono baldaŭ estas presota. Eldona Societo Esperanto en Stokholmo nun eldonis ĝin ankaŭ en Esperanto.

Ĝis nun la esperanta literaturo ne posedis tian modernan vojaĝpriskriban libron, sed per la mondfama libro de Dro Bergman ni ekhavis ne nur science fidindan verkon pri malproksima, nekonata lando kun ĝiaj strangaj popoloj, kulturo, bestaro k. t. p., sed ankaŭ interesegan libron plenan de mirindaj travivaĵoj kaj aventuroj.

La libro estas presita sur eleganta papero kaj ilustrata per multaj bildoj laŭ fotografajo prenitaj de la aŭtoro mem kaj liaj kamaradoj. Ni antaŭvidas, ke la esperantistaro bone akceptos tiun valoran pliriĉigon de la kreskanta esperantoliteraturo.

„Esperanto per Esperanto“. Lernolibro de la lingvo Esperanto laŭ senpera (rekta) metodo. Kun metoda enkonduko. Prilaboris **LEONO VIENANO**. Eldonejo N. Sapiro Warszawa, Nowolipki 8, Prezo zl. 1.75 aŭ 0.20 dolaro. Pola poŝtĉekkonto: Warszawa, 16.562.

La sistemon de tiu ĉi libro formas kvar jenaj postuloj pedagogiaj:

1) eblo de instruado laŭ senpera metodo (t. e. ne uzante tradukan lingvon) al plenkreskuloj sen iuj iloj aŭ specialaj ilustraĵoj helpe de ordinaraj objektoj, kiuj troviĝas preskaŭ en ĉiu ĉambro, tono, simplaj movoj kaj ĝestoj.

2) por eviti la enuigan sistemon de apartaj frazoj ne interligitaj per iu komuna senco, troviĝas eĉ en la komencaj lecionoj facilegaj rakontoj, kies primitiva stilo respondas precize ĝramatikajn kaj vortajn sciojn de la lernanto en koncerna leciono.

3) en ĉiu rakonto troviĝas nur tiaj formoj ĝramatikaj, kiajn la lernanto jam ekkonis en la antaŭaj lecionoj.

4) la ĝramatiko estas klarigata laŭ indukta metodo, t. e. el specialaj ĉapitroj ĝramatikaj la lernanto mem konkludas koncernajn regulojn.

El la kvar supre menciitaj punktoj de la sistemo oni povas facile konkludi ke la aŭtoro ne intencis sole pligrandigi la nombron da tiomaj lernolibroj kaj ĉiuspecaj memlerniloj sed kiel sperta pedagogo li prilaboris novan kaj originalan sistemon kiel instrui lingvon, laŭ senpera metodo al plenkreskuloj.

PERSONAJ INFORMOJ.

Al ĝesinoroj Dr. Stan, Kamaryt naskiĝis filo nomita Paŭlo Stanislavo. Al la ĝepatroj ni prezentas korajn bondezirojn.

Z REDAKCE.

Velkou část tohoto čísla věnujeme dvěma důležitým shromážděním čl. esperantistů: valné schůzi Svazové v březnu a sjezdu čl. esperantistů v květnu.

Z tohoto důvodu vynecháváme některé rubriky, které otiskneme zase v čísle květnovém. Velmi litujeme na př. vynechání *Lingva Fako*, které se setkává s velkým zájmem zvláště našich nových abonentů, od nichž dostali jsme zejména značný počet překladů obou textů.

Rovněž slíbený výsledek soutěže literární přineseme v čísle květnovém a doufáme, že naši přátelé nám ještě odpustí toto poslední zdržení.

Děkujeme všem, kteří již zaslali předplatné na letošní rok a těšíme se, že tak učiní všichni, kteří si ponechali dosavadní čísla.

Prosíme, abyste laskavě věnovali pozornost zprávě o valné hromadě, jakož i zprávám o sjezdu.

BULTENO

DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA, PRAHA XIX. URALSKE NÁM. 447.

NUMERO 44. - APRILO 1932.

LA XIII. ĜENERALA KUNVENO

de la Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista okazis la 20-an de marto 1932 en Praha, kafejo Louvre, de 9.45 h. ĝis 16.30 h. kun tagmanĝa paŭzo unuhora.

Ĉeestis 28 membroj el 9 lokoj (Bakov, Bratislava, Horní Litvínov, Hradec Králové, Kladno, Pardubice, Praha, Přebouch, Prostějov), skribe reprezentitaj 62 membroj, sume 90 m. Gasteco partoprenis 4 p. Senkulpigis sian neĉeeston vicprezidanto dr. Pitlík.

Salutaj leteroj venis de gesinjoroj: prof. Jukl (Bratislava), Kiss (Bratislava), Grauerová (Přerov), M. Jelínková (Brno), A Kudela (Olomouc), J. Šupichová (Praha), Dr. Ježdík (Praha), Fr. Dejmek (Praha) kaj Laborista Societo Plzeň. Saluton de Societo de ĉeĥoslovakaj nevidantaj esp-istoj transdonis Vuk Ečtner.

Antaŭ komenco de traktado la prezidanto rememorigas mortintan membrinon fraŭlinon Řeháková el Horní Kostelec; la ĉeestantoj honorigas ŝin per ekstaro.

1. **Protokolo pri la pasinta ĝenerala kunveno** estis aprobita sen legado, ĉar ĝi estis enpresita en Progreso p. 45. pasintjara.

2. **Raporto pri agado de komitato en 1931.** Ĉar ĝi estis enpresita en Bulteno tiujara p. 25-32, kunveno decidis ne legi ĝin, sed tuj pridiskuti unuopajn alineojn.

a) **Rezigno de la multjara ĝenerala sekretario Hromada.** La prezidanto diras, ke al la vortoj en la presita raporto decas aldoni ankaŭ en la parola debato dankon al samideano Hromada pro multaj faroj, kiujn li iniciatis kaj efektiviĝis, sed precipe pro lia persistemo, sen kiu versimile nia Asocio ne estus iam povinta eĉ ekzisti.

b) **Membraĵ kunvenoj.** S-ro Heikenwälder plendas, ke la kunveno en Brno ne estis anonciita ankaŭ al esp-istoj ekster Brno, kiuj certe ankaŭ estus venintaj. La prezidanto klarigas, ke pri publikigado kaj invitado estis komisiita la Klubo en Brno. Naskiĝis diskuto, kiu rekomendas sendi delegitojn de la Asocio al kunvenoj de esperantistoj ekster Praha kaj instigi la eksterprahajn grupojn sendi delegitojn al kunvenoj en Praha, precipe al ĝenerala kunveno de la Asocio. Debatis Heiken-

wälder, Weisskopf, Fousek, Sklenčka, Sustr, Pytloun, Michalová. Rezultis ĉiuvoĉe akceptita rekomendo al la kluboj, ke ili sendadu al la ĝeneralaj kunvenoj de la Asocio siajn delegitojn, al kiuj ili rekompencu la elspezojn. La kluboj petu ofte la Asocion, ke ĝi sendu sian delegiton en ilian lokon, por informi la samideanojn aŭ la neesperantistan publikon pri nia movado aŭ pri organizaj problemoj. La elspezon pagu plej ofte la invitanta grupo, kio ne malebligas, ke escepte pagu ĝin ankaŭ la Asocio.

c) **Korespondantoj.** Pro nekompleteco de la reto rekomendis pluraj parolintoj komisiu iun anon, kiu zorgus sole pri ilia elserĉo kaj aktivigo. Ankaŭ utile estus fari provizoran nomaron kopiitan ciklostile por informo de interesatoj.

d) **Bulteno.** S-ro Heikenwälder petis, ke la kunveno esploru, ĉu la pago por la Bulteno ne estas tro alta aŭ superflua aŭ ĉu ĝi estas laŭrajta. Li ricevis kiel redaktoro de Ligilo instigojn de pluraj esperantistoj, ke li skribu kontraŭ tiu aranĝo kaj ĝenerale kontraŭ la Asocio, ĉar ĝi laŭ aserto de tiuj informantoj ne sufiĉe ekonomie mastrumas kun la membraĵ kotizoj. Li volas aŭdi pri tio opiniojn de la ĉeestantoj por povi respondi al tiaj konsiloj per informoj ricevitaj ankaŭ de la personoj gvidantaj la Asocion. La prezidanto respondis, ke laŭ statuto kaj laŭ juro sen iu dubo nenio estas riproĉinda. La komitato en jaro 1925 faris kontrakton kun eldonanto de Progreso, laŭ kiu li publikigos en ĝi asocian Bultenon. Por tio li ricevas por ĉiu kvar-paĝa numero 250 Kč; jare aperos maksimume 10 numeroj, do li ricevos 2500 Kč. Tium kontrakton plenumas la ambaŭ partioj. En la pasinta jaro ricevis La Progreso laŭ nombro de aperintaj paĝoj 2375 Kč, en jaro antaŭa 2500 Kč. Kompreneble en la jaroj, kiam La Progreso aperadis neregule, ankaŭ la pago por la Bulteno estis malpli granda kaj ĉiam respondis al la nombro de paĝoj kaj la interkonsentita prezo. Neniam ankaŭ venis al la komitato iaj plendoj pri tiu ĉi aranĝo kaj la ĝeneralaj kunvenoj ĉiam aprobis raportojn tion rilatantajn. Ankaŭ la sumo mem ne ŝajnas alta, ĉar kiam en julio kaj oktobro 1929 la komitato eldonis dum neaperado de Progreso du numerojn de memstara Bulteno, la elspezo

estis proksimume duobla. La varba numero de Bulteno (n-o 33) estis eldonita de la Asocio mem kaj kompreneble pagita plene. Ni eldonis ĝin kun la titolo de Progreso por uzi la ĵurnalan afrankon. Ke ĝi estis dissendita kun la decembra numero de P., estis tre utile por ĝia celo. Laŭ spertoj de kasisto Sklenčka estis tiu eldono tre utila. Dum unu jaro la tuta kvanto de ekzempleroj estis preskaŭ elĉerpita, nun restas sole ĉ. 50 ekz. Do povas neniam temi pri iaj neregulaĵoj. Tamen la prezidanto ŝatas la iniciaton de s-ro Heikenwälder. En la lasta tempo estas legataj kaj aŭdataj diversaj aludoj, kiuj povas havi kaŭzon en neinformiteco aŭ en malbona volo. La senkaŝa diskuto povas certe helpi al forigo de atmosfero, kiu iĝus tro peza, se oni lasus sen klarigo anonimajn aludojn. Nek la komitato nek komitatano Hromada havas ion por kaŝi, tial ili eĉ salutas tiun ĉi diskuton. En sekvinta longa debato estis dirite: 250 Kč por kvar paĝoj ne estas tro (Heikenwälder), ĝi estas malmulte (Votrubic, Herzigová). Oni devus pripensi, ĉu ni ĉiam povos pagi bezonan sumon por la Bulteno, se mankos en la kaso eksterbuĝetaj enspezoj kiel estis Dana filmo kaj Scherer-vojaĝo (Weisskopf). La fakto, ke ni ĉiam sukcesis fini sen deficiente malpravigas tiun ĉi timon. (Hromada, Sustr). Guste ebleco raportu detale pri la komitata agado kondiĉas sukceson de entreprenoj alportantaj enspezojn (Kamaryt). Verŝimile malpli detala raportado pri la komitata agado estus konsilinda; ne ĉiuj emas legi tiujn raportojn. (Heikenwälder). La raportoj ne estas tro detalaj; oni neniam enpresas pri formalajoj, la raportoj pri la decidoj estas koncizaj, pri traktado nur se estas ial raportinda. Tia raportado estas necesa, por ke la membraro vidu, kiom kaj kiel la komitato laboras. Legi ĝin devas ĉiu aktiva samideano (Hromada, Sustr). Eĉ publikigo de la ĉeestintoj en la kunveno estas interesa, ĉu ano eĉ volas legi, kiu ne ĉeestis (Fousek). Oni ofte spertis, ke Bulteno estas atente legata (Herzigová) kaj bone redaktata (Sustr). S-ro Hromada resume respondis al diversaj aludoj, kiujn kelkaj samideanoj, ofte anonimaj, preferas al kritiko. Ni ne timas kritikon pri nia agado kaj farado, ni ja plenumas publikan funkcion, sed ni nepre malakceptas kaŝitajn aludojn kaj duondirojn. Li rememorigas tempon, kiam li ofte restis unusola por tuta asocia laboro. Estis kaj estas neeble, ke ni lasu taskojn unufoje prenitajn kaj foriru. Sed estas eble kaj necese, ke ni forigu el niaj vicoj kutimojn de nehonestuloj. Lia parolo estis akceptita kun tre spontanea aplaŭdo. Poste proponis s-ro Weisskopf elekti komisionon, kiu esplorus

problemojn pri Bulteno fuŝitajn en la debato. Por elekto de la komisiono parolis Michalová, kontraŭ Herzigová. Dum plua debato estis fiksita kiel tasko de la komisiono: esplori, ĉu estus utile ŝanĝi ion en la kontrakto inter eldonanto de La Progreso kaj la Asocio pri publikigado de la Bulteno; sian rezultaton ĝi transdonos al la komitato, kiu poste decidus definitive. Ĝis tiam validas la kontrakto senŝanĝe. La elekto de la komisiono estis akceptita ĉiuvoĉe. Same ĝiaj anoj: Ginz kiel prezidanto, Weisskopf kaj Barešová kiel membroj.

e) **Studentoj.** Oni atendas plivigliĝon de la intereso inter studentaro post dissendo de la alvoko ĵus aperinta (Sedláček).

f) **Propagando per gazetoj.** La organizita perletera manifesto por esperanto ĉe unu gazeto tre sukcesis. (Informas Ginz). S-ino Herzigová rekomendas atenti la emon por esp. kurso en organoj de fervojistoj. La kolekto de gazetaj eltranĉaĵoj el jaroj 1931 kaj 1932 bele aranĝita disponigita al ĉeestantaro trovis merititan admiron.

g) **Enketo de komercaj ĉambroj.** Prezidanto informas, ke al la kvar ĉambroj nomitaj en la alineo 16. estas aldonotaj ankoraŭ tiuj de Brno kaj Olomouc. La tieaj grupoj informis nin nur post publikigo de nia raporto.

h) **Scherer-vojaĝo.** S-ro Sustr esprimas sian miron pri aserto en unu letero de s-ro Kudela, ke rezulto de Scherer-paroladoj en Olomouc estis nula. Lia sperto en Praha kaj en Bakov estas tute kontraŭa. Parolas pri tio Ginz, Sklenčka, Heikenwälder, Weisskopf, Kamaryt. Generale oni konsentas kun opinio esprimita en la komitata raporto. Iu speco de seniluziigo ĉe kelkaj samideanoj estas klarigebla per troa fido al la reklamo. Oni ne povis atendi superhomon. S-ro Ginz postulis konstati, ke Asocia profito el la aranĝo estis 937 Kč, do ne multaj miloj, kiel rakontis la famo.

i) **Radio.** Komisionestro Ginz rekomendas pli intiman kontakton de la prelegontoj kun li. Li povas doni al ili helpon rimarkindan. S-ro Votrubic rekomendas zorgi pli intense pri poŝtistoj: li donas unu adreson por laŭcela uzo. La publikigita raporto estis ĉiuvoĉe aprobita.

3. **Raporto pri kaso kaj de la revizoroj.** La prezidanto atentigas pri la publikigita raporto de kasisto Sklenčka kaj pri modele farita detala bilanco disponigita al ĉiu interesato. La detalan revizion de ĉiuj enskriboj en la libro kaj de dokumentoj faris s-ro V. Černý, oficisto de Průmyslová banka en Hradec Králové, elektita de la kontrola komisiono kiel ĝia prezidanto. Lian raporton konfirmitan tre bonan ordon

en la librotenado kaj kaso legis s-ro Pytloun. La kasista raporto estis poste ĉiuvoĉe aprobita.

4. **Asocio organo.** Ĉar oni jam detale parolis pri ĝi dum debato pri Bulteno, nun oni esprimis nur kontenton pri ĝenerale plaĉanta nova tipografia aranĝo kaj konvinkon pri ĝia nepra neceso por la movado.

5. **Elektioj.** La prezidanto informas, ke pro rezigno vakiĝas postenoj de s-roj Brambora, Ginz, Pitlik kaj pro lotumado de s-ro Friedrich. Inter ili samideano Ginz deklaris denove, ke li ne povas plenumi la ripetitan peton de la prezidanto kaj de ĉiuj ceteraj komitatanoj denove akcepti la funkcion en la komitato. La laboroj, kiujn li dum la lastaj du jaroj plenumadis por la Asocio, elĉerpis lin tiom, ke lia sano estas grave afekciita. Tial li ŝuldas al deo, kiun ĉiu viro havas al sia familio kaj al si mem, ne akcepti funkcion, kiu lin streĉus daŭre super poveblo. Ĉiuj ĉeestantoj esprimis vivan bedaŭron pro perdo de komitatano tiom oferema kaj tiom kapabla, kaj rĵpete petis lin, akcepti almenaŭ funkcion de simpla komitatano. Kiam s-ro Ginz deklaris, ke ne estas al li eble ŝanĝi sian decidon, la prezidanto rememorigis la gravecon de servoj, kiujn faris la eksiganta ĝenerala sekretario al nia Asocio kaj al movado ĝenerale, dankis lin pro tio en nomo de ĉiuj ĉeĥoslovakaj esperantistoj, kiu dankesprimo estis aplaŭde aprobita de la ĉeestantaro. Poste la prezidanto deklaris proponon de la komitato pri la novelektotaj: Brambora, Friedrich, Stanĉek Miloslav. Ili estis elektitaj akklamacie per ĉiuj voĉoj. Kiel reprezentanto de la Studenta sekcio estis reelektita s-ro Vi. Sedláĉek. Inter vickomitatanoj vakiĝis per lotumado postenoj de s-oj Kudela kaj Slavik, estis elektitaj ĉiuvoĉe s-roj Heikenwälder kaj Slavik. En kontrolan komisionon estis elektitaj s-roj Bujarek, Ĉerný, Koneĉný, Mastný, Pytloun, kiel anoj kaj ges-roj Hanzelka, Holancová, Střihavka, kiel anstataŭantoj. La nomaro rezultinta el tiu ĉi elekto estas sur p. 46.

6. Liberaj proponoj.

a) La dekdujara laboro de s-ro Hromada, kiel ĝenerala sekretario, pri kiu oni estis devigita paroli dum la flujara kunveno dum diversaj debatoj kaj diskutoj aperis en rememoro de la ĉeestantoj kaj elvokis spontanee deziron esprimi senton de rekono pri tiu laboro. En tio naskiĝis propono rezolucie deklari, ke la ĝenerala kunveno dankas al samideano Hromada pro multaj kaj gravaj servoj, kiujn li

faris al la Asocio kaj al la movado. La propono estis akceptita ĉiuvoĉe.

b) La ĝenerala kunveno rememorigas ĉiujn esperantistojn en la respubliko, ke dum pentekosto okazas en Olomouc nia kvina kongreso kaj rekomendas al ĉiuj partopreni mem kaj zorgi pri la plej granda partopremo.

Ceteraj proponoj: Publikigi artikolon pri studentoj en ĉeĥoslovakaj gazetoj, Aldonigi la Pojtko en Národní Politika (Křivancová), Malaltigi la kongresan kotizon (Grauerová), Aranĝi kurson por kandidatoj de ekzamenoj (Baroch), Ŝanĝi asocian kotizon (Klubo en Kolín) ne povis esti pritraktataj pro formalaj kaŭzoj. Tial ili estis transdonitaj al la komitato.

La kunveno estis finita per danko de la prezidanto al la ĉeestintoj pro vigla kaj atenta partopreno en agado.

Dr. ST. KAMARYT,
prezidis.

A. TARANTIKOVÁ,
protokolis.

I. KOMITATA KUNVENO

okazis 20-an de marto-tuj post fino de la kunveno ĝenerala. Ĉeestis komitatanoj kaj vickomitatanoj: Herzigová, Hromada, Kamaryt, Sklenĉka, Stanĉek Frant., Ŝustr, Tarantiková, Sedláĉek, Fousek, Slavik, Votrubeck, Heikenwälder. Krom ili pluraj membroj ĉeestintaj la ĝeneralan kunvenon.

La ĉefa punkto de programo estis

Divido de la funkcioj.

Pritraktinte la situacion laŭ diversaj vidpunktoj kaj aŭdinte kun ĝoja aprobo la informon de la ĉeestanta samideano Ginz, ke li daŭre kunlaboros laŭ sia eblo kaj ke li finos laborojn de li komencitajn, oni interkonsentis pri jena divido de funkcioj kaj laborotaskoj:

Prezidanto: Dr. Stan. Kamaryt.

Vicprezidanto: Dr. Augustín Pitlik.

Estro de Asocia Oficejo: Fr. Slavik. Laŭ lia adreso (Praha-Bubeneĉ, Urafské nám. 447) estu sendataj ĉiuj Asociaj korespondadoj de ĝenerala intereso. Li ilin registros kaj transdonos por plua agado al la koncernaj funkcianoj:

Unua sekretario: Jar. Ŝustr.

Dua sekretario: Růžena Herzigová.

Tria sekretario: Anna Tarantiková, (protokoloj).

Kasisto: O. Sklenĉka.

(Daŭrigo sur p. 46, dua kolono.)

CAE-GVIDANTARO

por 1932.

Komitatanoj:

- Lad. Brambora, oficisto, Praha XII., Soběslavská 2248.
 Jos. Friedrich, fervoj-konsilisto, Košice, Jarná 13.
 Růžena Herzigová, of., Praha XI., Karlova 8.
 Rud. Hromada, fakestro, Praha VII., Sochařská 333.
 Dr. Stan. Kamaryt, prof., Bratislava, Zochova 3.
 Dr. A. Pitlík, ĉefsekretario en kom. ministerio, Praha II., Křemencová 17.
 Otto Sklenčka, librotenisto, Hradec Králové, Masarykovo n. 628-a.
 Frant. Staněk, studento, Praha XI., Svatoplukova 22.
 Miloslav Staněk, Praha II., Příkopy 24. (fa Neff).
 Jar. Šustr, komercisto, Praha I., Dlouhá 53.
 A. Tarantíková, ofic. Praha XI., Karlova 8.
 J. Vondroušek, Brno, Dobrovského 6.
Reprezentanto de la Studenta sekcio:
 Vlast. Sedláček, stud., Praha II., Tyršova 12.-III.

Vickomitanoj:

- Dr. Josef Fousek, advokato, Přebouč.
 Fr. Heikenwälder, ofic. Prostějov, Masarykovo nám. 33.
 Jos. Janda, hotelisto, Praha II., Jindřišská 7.
 Fr. Slavík, ofic., Praha XIX., Uralské 447.
 Bož. Vlčeková, ofic., Dubí, p. Vrapice.
 Ferd. Vostrubec, pošta ĉefsekretario, Praha VII., Schnellova 21.
Membroj de Kontrola komisiono:
 V. Bujarek, Nové Zámky, Hlavní pošta.
 Vilém Černý, bankoficisto, Hradec Králové.
 Dr. Ad. Konečný, advokato, Jaroměř.
 Jar. Mastný, fabrikisto, Olomouc, Riegrova 17.
 Fr. Pytloun, fervojisto, Bakov.
Vicmembroj de Kontrola komisiono:
 Fr. Hanzelka, oficisto, Lazy.
 A. Holancová, lerneja direktorino Vyškov.
 V. Střihavka, of., Kladno, Kübeck 980,

(Komenco sur p. 45.)

Administrado de membroj: O. Sklenčka.
 Redaktoro de Bulteno: Rud. Hromada.
 Literaturaj aferoj: Rud. Hromada.
 Radio: O. Ginz.
 Gazetara servo: O. Ginz.
 Turismo: Dr. A. Pitlík.
 Lernejoj: Dr. St. Kamaryt.
 Sciencaj aferoj: Dr. Stan. Kamaryt.
 Studentaj aferoj: Vl. Sedláček.

En fakaj aferoj oni povas turni sin senpere al la koncerna komisionestro!

Ekspozicia materialo: Ĉar s-ro Šustr estos plene okupita de la sekretariaj laboroj, li ne povos zorgi pri ĝi. La materialo povas esti plej taŭge administrata en iu urbo en Moravio. S-ro Heikenwälder promesas zorgi por trovi kompetentan membron, plej bone en Brno, kiu konsentus administri la materialon. Ĉar ni posedas relative taŭgan ŝrankon por ĝi, la afero ne estas tro malfacila. La servokapabla samideano multe helpus al ni, se li prenis tiun ĉi taskon kaj zorgo ĝin plenumus. Ni alvokas niajn membrojn bonvoli anonci sin aŭ ĉe s-ro Heikenwälder aŭ ĉe nia sekretario.

Arkivo: Funkcio de komisionestro vakas. Povus esti administrata ankaŭ de ekster-praha samideano, kiu emus ne troan, sed daŭrant laboradon.

Kontakto kun ceteraj naciaj societoj.

Laŭ propono de la prezidanto estis decidite dissendi al ĉiuj naciaj societoj reprezentitaj en KR ekzempleron de nia raporto pri agado kun peto, ke ili diru al ni sian opiniojn pri niaj aranĝoj kaj sendu al ni sian raporton pri jaro 1931.

ĈEHOSLOVAKA

GAZETARO KAJ ESPERANTO.

Robotnické noviny, Bratislava daŭre informas sian legantaron pri nia movado. Ni legis interesajn sciigojn la 11. III. (tri), 13. III. kaj 15. III. —

Rozsevač, En nro 2/1932 ni vidis daŭrigon de la esperanta kurso de prof. Klement Urban. Por la kursanoj estas aldonitaj ĉiam kelkaj sciigoj pri niaj progresoj.

Rudé Právo 12. II. En artikolo pri laborista demonstracio en Olomouc mencio, ke dum ĝi estis ankaŭ tralegita kaj kun entuziasmo akceptita letero de sovetlandaj esperantistoj.

Skaut-junák 20. II. Longa artikoloj pri esperanto kaj skoltismo.

Národní Politika alportas la kronikon El esperanta mondo de J. Šupichová 2., 6., 16. kaj 23. III. La 27. III. ĝi havas interesan tradukon (ankaŭ de Šupichová) pri la paska vizito de Scherer en Jerusalemo.

Věstník sokolský, centra organo de Sokola organizo, mencias 11. II. laŭde la artikolon pri Sokoloj de Josef Haman publikitan en Heroldo de Esperanto.

Slovíčko. Tie ni vidis la 13. kaj 23. III. daŭrigajn lecionojn de la esperanto-kurso de J. Šupichová.

České Slovo Mor. Ostrava 27. III. parolas en artikolo „Esperanto internacia lingvo de disaŭdigo“ pri la laboro de esperantistoj en kampo de radio.

Lidové noviny Brno 25. III., rakontas pri okazintaĵo el la vivo de la eminenta ĉeĥa politikisto Gustav Habrman, ĵus mortinta, kiam li estis devigita en ĉeĥa laborista kunveno en Bremen paroli pri esperanto.

Pozor Olomouc 24. III., Lastaj kanibaloj de Suda maro, traduko el la espa revuo ISK.

Věstník sokolské župy těšínské Nový Bohumín en nro 3/1932 informas pri la esperanta radioparolado de Jar. Hladký temanta pri Tyrš, la fondinto de Sokol. La saman informon ni legis en **Národní osvobození** 18. III.

Česká jednota všeodborová Chlumín nro 2/1932 raportas pri ŝtata subteno al esperanto en Hispanio.

Spravedlnost Chicago 11. III. sciigas pri nia nunjara Esperanto-kongreso en Olomouc.

Pri la pariza XXIV-a ni legis ankaŭ en **Nasz lud.**, Český Těšín 2. IV.

Alia pollingva gazeto ĉeĥoslovakia **Robotník** Slaskí Karvinná havas 18. III. longan artikolon pri la signifo de esperanto por la laborista movado.

De **Písecké kaj Prácheňské listy** en Disko kaj de **Stráž** en Třebíč ni havas novan grandan kolekton de priesperantaj artikoloj aperintaj dum la lasta tempo.

Narodnoje russkoje slovo Užhorod 11. III. havas en sia ĉeĥa aldono du notojn koncernantaj la uzon de nia lingvo en lernejoj aferoj.

Důvtip, revuo de enigmoj, alportas en sia nro de 2. III. krucenigmon „Por amikoj de esperanto“ en formo de kvinpinta stelo.

Agenda Police 1. III. priskribas sub titolo „Per esperanto al tutmonda paco“ per trafaj vortoj koncize la signifon de nia lingvo.

A-Zet 27. II. en serio „Mil popularaj sportistoj“ aperigis portreton de Ferdinand Votrubeč, prezidanto de la Sportista unuiĝo de poŝtistoj kun aldono pri lia laboro por esperanto. La samon ni legis en **Pestrý týden** 30. I.

České listy Ml. Boleslav. Nunjare ni legis pri esperanto tie jam plurfoje: 8. I., 22. I. 29. I., 5. II. 1932.

Ewangelik, pola gazeto aperanta en Český Těšín raportas pri nia movado la 2. I. kaj 12. III.

En **Hlas lidu** Prostějov 16. II. ni legas, ke la Laborista akademio proponis al la urbestro aranĝon de esperanta kurso por policanoj.

Hlasy od Berounky Beroun 6. II. parolas pri rondeto de metilemantoj tieaj kaj pri ilia sukcesa lernado de nia lingvo.

Pri la elektro-bojkoto en Bejrut raportas laŭ Heroldo de Esperanto la ĵurnalo **Nový večerník**

„Vi ŝparos monon, se vi aĉetos tolaĵon kun la verda esperanta stelo“ estas anonco, kiun ni legis en la supra **Nový večerník** kaj en **Polední list** 8. III.

Polední ostravský deník Mor. Ostrava 3. III. Esperantaj interesajoj, resumo pri esp. okazintaĵoj lastatempaj.

Předvoj. En nro de 15. II. ni trovis ŝajne jam duan daŭrigon esperanta kurso, gvidata de Josef Pech.

Revo **Žijeme** nro 11/1932 parolas prudente pri la ruĝkruca interkorespondado de infanoj farata nun pene kun helpo de tradukoj: „Kaj kial ne anstataŭ tradukoj enkonduki pro ili esperanton? Ĝi kaŭzus laboron, sed ĝi povus esti viva sen la netolerebla dirado pri frateco de ĉiuj nacioj“.

O. Ginz

Státní zkoušky z esperanta pro vyučování esperanta na školách obecných a měšťanských konaji se v polovici dubna a listopadu při státní zkušební komisi učitelského ústavu v Praze II. Panská ul. 3. (Informace o zkouškách, žádostech, dokladech, taxách a j. viz v „Poučení o učitelských zkouškách“ od Dra Majera.) Přihlášky měsíc předem. Žádost kolkuje se 5 Kč. Doklady: Curriculum vitae se seznamem spisů, z nichž se kandidát připravoval, křestní list, poslední vysvědčení školské, vysvědčení zachovalosti, vysvěd. lékařské. Poplatky (splatné po zkoušce): 50 Kč zkušební taxa, 8 Kč kolek na vysvědčení, 4 Kč tiskopisy. Absolventům gymnasií, reálék a obchodních akademií odpouští se zkouška z češtiny, učitelům a profesorům mimo to též z pedagogiky a školských zákonů. Ostatní kandidáti konají zkoušku z češtiny (české mluvnice), pedagogiky, školských zákonů a esperanta. Pra-

meny: Kterákoli mluvniče češtiny, „Obecná pedagogika a didaktika“ od Švadlenky, „Sbírka školských zákonů a nařízení“ od Buzka. Z esperanta koná se zkouška písemná na stanovené thema dopoledne, odp. pak ústní. Žádá se: 1) Znalost fundamentálního slovníku: Dra Zamenhofa (v Klíči Č. E. Institutu), 2) esp. mluvniče podrobně, 3) výklad zajímavých tvarů a obrátů esper. na základě překladů z češtiny do esperanta a opačně. 4) Nejdůležitější díla esperantské literatury původní a přeložené, životopis Zamenhofův, organizace esper. hnutí domácí a světová. (Pomůcka: „Rádce českého esperantisty“ od Šupichové a „Vivo de Zamenhof“ od Dra Privata.) Zkoušky v Praze mohou skládati kandidáti z celé republiky.

Dr. Aug. Pitlík.

MEMBRA KOTIZO DE ĈAE

KĚ 16.—.

(subtenantoj KĚ 50.—, dumvivaj KĚ 500.—).

Sendu aliĝan poŝtkarton
al Otto Sklenčka, kasisto de ĈAE, Hradec Král. 628a
Ceteran korespondajon por ĈAE adresu al
Praha XIX. Uralské, 447.

Slovníky:

Kühnl-Procházka: Slovník česko-esper., váz. Jediný česko-esp. slovník, 25.000 slov	31.—
Čánský-Riedl: Slovník esper.-český. Obsáhlý, mnoho slov, i odborných	21.—
Filip Jan: Velký slovník esper.-český. Obsáhlý, mnoho odvozenin 41.—, váz.	51.—

V kursech, které chystáte, použijte... Svým známým k domácímu učení doporučujte...

UČEBNÍCI A CVIČEBNÍCI
MEZINÁRODNÍHO JAZYKA

ESPERANTO

OD PROF. DRA ANT. ŠILHY

96 stran. — Cena KĚ 10.60 s portem
Při odběru aspoň 5 výtisků sleva.
Vydalo La Progreso, Praha VII.

ETERNA BUKEDO

estas la plej nova granda verko de

K. KALOCSAY

enteranta senvelkajn florojn el la poezioj angla, bulgara, ĉeĥo, ĉina, egipta, estona, finna, franca, germana, greka, hebrea, hispana, hungara, itala, japana, latina, nederlanda, pola, portugala, rumana, rusa, sveda.

Interpretite per perfekta formo, mirinda trasento kaj enlula vortmuziko, estas en la libro poemoj de:

Faraono Ahn-Aton, Reĝo Salomon, Horatius, Catullus, Anakreon, St. Francisko de Assisi, Sappho, Walter von der Vogelweide, Dante, Lope de Vega, Ronsard, Chausser, Shakespeare, Milton, Spenser, Keats, Shelley, Goethe, Schiller, Heine, Lenau, Baudelaire, Verlaine, Lamartine, Victor Hugo, Verhaeren, VRCHLICKÝ, Mickiewicz, Vazov, Li-Tai-Po, Petöfi, Ady, Hitomaro, Curajuki, Puŝkin, Lermontov, Strindberg, Henriette Roland Holst, Steccheti, Carducci, Leopardi, Camoens, Under, Semper kaj ceteraj.

La volumo, 13.5x20cm granda, 352 paĝa sur unuaranga papero, en duonleda bindo kostas usonajn dolarojn 2.20. Aldonu 10% por sendkostoj.

Eldonis LITERATURA MONDO, Budapest IX. Mester-u 53. V. 7. Mendu de la eldonejo, aŭ de la reprezentanto de literatura mondo

O. SKLENČKA, Hradec Král. 628-a.